# Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, la 6-an de Novembro 2023

**Ĉeestantoj *(zome pro la milita stato)***: Jehoŝua Tilleman, Dror Gaon, Mikaelo Lineckij, Inbar Mor, Ŝlomo Ŝaĥar, Amri Wandel, Gabi Zeevi. **Gastoj *(partatempe)***: Ŝulamit, Viktor, Espero.

***Protokolo** de la pasinta kunsido estis sendita al la estraranoj kaj baldaŭ enretigota.*

## 1. Raportoj

a) **Amri**: skribis al ELI la telavivano Eliezer Drezner, la nevo de Naĥum, iama eminenta israela e-isto, kiu volas transdoni la fotoalbumojn de sia onklo, kun fotoj de multaj UK-oj. Amri parolis kun li kaj sendis la detalojn al Jehoŝua kaj Dror. **Jehoŝua** petos detalojn telefone, sed ne povus porti, do eble **Dror** povos transporti la albumojn al la kelo de Doron.
b) Karina Oliveira, la redaktorino de ***Kontakto*** petis, ke **Amri** verku artikolon pri la milito; sendita al Gabi kaj Jehoŝua antaŭ unu semajno.
c) **Amri**: riproĉa letero venis de portugala esperantisto. **Jehoŝua**: sendu al li vian artikolon por ***Kontakto***.
ĉ) **Amri** proponas aldoni al la tagordo eventualan deklaron de ELI pri la milito (***Akceptita***).

## 2. Zamenhofa Vespero (Jehoŝua)

Ĝi okazos hibride, en la Alon-turo-2 kaj zome, lundon, la 18-an de Decembro, je la 17h45; la programo ekos je la 18h00. **Jehoŝua** ankoraŭ serĉas pliajn volontulojn por la arta parto. La Ĝenerala Kunveno devos elekti por du jaroj novajn Estraron kaj Kontrol-Komisionon.

## 3. La modifiita Buĝetpropono por 2024 (Ŝlomo)

**Ŝlomo** dissendis la detalan modifitan proponon, ĝi estas montrata sur la ekranoj. La atendata enspezo pro membro-kotizoj estis korektita al 4,000 NIS.

## 4. La enormaj poŝtelspezoj pro *Israela Esperantisto* (Jehoŝua)

**Jehoŝua** antaŭmendis vicon en **poŝtagentejo** por forsendi kun **Mikaelo** la duoblan ***IE***. La oficistino, kiu rapidis hejmen, riproĉis pro la horo, ne rabatis por la kvant-sendado enlande, kaj tute ne akceptis la sendon eksterlanden; do necesis kroma vico en **poŝtoficejo**. Tie ekestis problemoj pri la divido en land-kategoriojn. Fine la sendokostoj estis 473 NIS enlande, 2475 NIS eksterlanden; 3 kovertoj estis sendeblaj nur per EMS (ĉiu por pli ol 100 NIS) – do ne senditaj! **Amri** siatempe sendadis eksterlanden kontraŭ ĉ. 800 NIS; ĉe la poŝtagentejo el kiu li sendadis li informiĝis, ke la triobliĝo de la kostoj okazis pro du kialoj: (1) ne plu estas rabato por kvanta sendado; (2) la duobla numero superis la limon de 100 gramoj (je 8 gramoj), kio duobligis la afrankon. Ni devos konsideri draste limigi la nombron de eksterlandaj senpagaj ekzempleroj. **Gabi**: sed ni ja sendis duoblan numeron anstataŭ du sendoj de simplaj numeroj – tiel la sendokostoj etendiĝas al la tuta jaro, dividiĝante per 2. **Amri**: kompreneble, sed se estus iomete malpli dika, forsendo de duobla n-ro kostus la duonon de dissendo de du ordinaraj n-roj, ĉar dum mia redaktoreco la duobla n-ro estis 48-paĝa kaj pezis sub 100 gramoj.



eli@esperanto.org.il ,04-8705544 האגודה לאספרנטו בישראל (ע"ר), ת"ד 21132, תל-אביב 6121101, טל'
Esperanto-Ligo en Israelo (ELI), P.O.K. 21132, IL-6121101 Tel-Avivo, Tel. 972-4-8705544, eli@esperanto.org.il

**Jehoŝua**: restas la elspezo de **Mikaelo**, kiu devis porti la kestojn pagante 45 siklojn por taksio, sed la ŝoforo rifuzis kvitanci. **Ŝlomo** skribu kvitancon kaj pagu kontraŭ la subskribo de **Mikaelo**.

**5. *Israela Esperantisto*** (Mikaelo)

**Mikaelo**: Mi estas nun hejme, ĉar ĉiuj flugoj nuliĝis. Numero 176 estas jam enpaĝigita (**Gabi**: jam provlegita), krom la lasta (dorsa) paĝo. **Jehoŝua**: Ne atendu precizajn datenojn pri la aprila IK! Ni nenion skribu pri la IK, ĉar nun nenio certas. Ĉu eble enigi ion pri la milito? **Amri** samtage sendos al **Mikaelo** sian artikolon verkitan por ***Kontakto*** kun fotoj. **Pluraj**: Ĉu aperu ankaŭ deklaro de ELI pri la situacio? **Amri**: verkos koncizan kaj simbolan malnetaĵon, sendos al la estraranoj, tiuj diskutos kaj poluros (ne pli ol 4-5 tagojn), kaj la fina formulo aperos tuj en la retejo de ELI kaj poste en n-ro 176. **Mikaelo**: ĝi estos preta ĝis 15-a de Novembro. **Amri**: do eĉ disdonebla dum la ZV – allogilo ĉeesti fizike.

**6. La Israela Kongreso – Aprilo 2024** (Jehoŝua)

La hotelo "***Clilej Midbar***" en Dimona estas tro multekosta. Eble indus veturi tien kaj provi marĉandi – sed nun ne eblas. La hotelo "***Irus Hamidbar***" ne volis respondi telefone, Jehoŝua obstine sendis al ili prezpeton – ili afable promesis rekontakti lin, kaj ĝis tiam gardi la petitajn datojn. **Jehoŝua** proponas reveni al la antaŭa sugesto de Amri: kongresi en 2024 en Jerusalemo, kie estas pli da ebloj. **Amri:** eblaj lokoj por la IK 2024 estas la junulargastejo Rabin (en kiu ni gastis jam dufoje); ***Jerusalem Hostel*** – malmultekosta loko kun matenmanĝo (sed ne havas taŭgan salonon surloke – ĉu eble lui proksime?); kaj la junulargastejo Agron. ***La ŝanĝo al Jerusalemo estas unuanime akceptita!*** **Jehoŝua** baldaŭ esploros ilin telefone kaj raportos al ni. Nia intenco pri la Negevo kiel kongresloko ne estas nuligita – nur prokrastita al 2025.

**La venonta kunsido**: lunde, la 4-an de Decembro 2023, je la 20h00

*Protokolis: **Gabi Zeevi***